TEA-BULTENO

23ª JARO - N° 158 | MAJO-JUNIO | N. 5-6/2021

Feliĉo estas la sola afero, kiun oni povas donaci, eĉ se oni ne posedas ĝin.
Élisabeth Leseur, franca mistikulo (1866-1914)

Kara Legantaro!

La bela sezono estas alvenanta kaj ĝin ni bonvenigu ĝoje. Kiel eble plej baldaŭ la asociaj pordoj malfermiĝos al nia samideanaro, kaj respektante la bone konatajn regulojn, fine ni povos kunveni niasideje kaj kuntosti je rekomenco de normala, pli-malplia agado.

Ankoraŭ ne certas, ĉu ni rajtos libere iri ien ajn, sed nedubindas, ke ekzistos ebloj renkontiĝi etope kun geamikoj, dum por pli grandaj kunvenoj aŭ kongresoj ankoraŭ ni devas pacienci.

Se ne ĉeeste, eblos tamen kunestadi *virtuale* kaj partopreni en iu el la multaj proponoj troveblaj ĉe Eventa Servo: https://eventaservo.org/ kie certe altiros vian atenton iu alloga programo. Ne maltrafu ĉi okazon, por babili kaj kafumi kun angloj, sekvi kurson de brazilano por fine KER-ekzameniĝi, pasigi buntan vesperon en Herzberg - la E-urbo, aŭ partopreni en internacia libera babilado en Esperanto "Ĝis la fina venko"!

Nepre ne forgesu la UK-n, kiu okazosa en Belfasto: jam eblas aliĝi. Pliaj informoj ĉe https://vk.esperanto.net/.

Bonan esperantumadon ie ajn tra la tuta mondo!

Via redaktanto Elda

INFLUO SUR ESPERANTISTOJN DE LA VERDA STELO

Amo al Esperanto povas manifestiĝi en plej diversaj formoj, pli aŭ malpli simplaj, pli aŭ malpli okulfrapaj, pli aŭ malpli kuriozaj, depende de la inventemo kaj krea imago de la unuopula samideano. Do, indas ekscii, koncizete, kiam, ekz., ekflagris la ideo, ke bezonatas ia distingilo, ia rekonigilo surportenda de esperantistoj. Demando ja estas: Kian aspekton kaj formon havu tia ilo? En *La Esperantisto*, revuo redaktata ekde sept. 1889 ĝis aŭg. 1895, B.G. Jonson el Östersund prezentas al ties legantaro sian proponon, ekuzi ian difinitan signon *portotan sur la surtuta kolumo*: tio ĉi en dec. 1892. Multaj priaj reagoj estas publikigitaj en la februara numero, kio pruvas aprobon kaj konsenton de la plimulto - tio konkrete indikis, je ĉi punkto de nia historio, ke oni eksentis la neceson disinformi pri sia aparteno al adeptaro de Lingvo Internacia. Marte 1893, Louis de Beaufront *konsilas, ke la kovriloj de ĉiuj libroj de nia literaturo kaj entute ĉio, kio tuŝas nian aferon, havu verdan koloron kaj portu supre stelon. En tia maniero la verda koloro kun stelo (du simboloj de espero, esperanto) fariĝos la konstanta signo de nia afero kaj oni ĉiam tuj rekonos ĉion, kio apartenas al ĝi*. Diskutado pri tio daŭras sur la revuaj paĝoj ĝis la duono de marto 1895. La 7an de aŭg. 1905, dum la kunveno en Calais, okaze de la renkontiĝo de angla kaj franca samideanaro, dum la oficiala kunsido oni decidas, ke *la signo de la rekono por esperantistoj, kiun oni rekomendas por la kunvenoj k.c., estas la verda kvinpinta stelo*.

La sekvon de ĉi historio ĉiu el vi ja bone konas!

Tial oni ne devas miri ke...

STELFORMA DOMO EL 1930 ESTAS RESTAŬRITA KAJ MALFERMITA AL PUBLIKO (2013), ENE DE LA PONTIFIKA KATOLIKA UNIVERSITATO, EN CURITIBA, BRAZILO.



Ĝi estas konsiderata originala simbolo de la arkitekturo de Curitiba kaj ĝia restarigo celis i.a. la konservon de ĝia historio. Nuntempe la domo funkcias kiel ekspozicia spaco, krom esti la muzeo de familio Gonçalves de Castro, kiu tie loĝis dum 60 jaroj.

Konstruita en la 1930aj jaroj, ĝi vidis de malproksime la tutmondan ekonomian krizon de la Novjorka Borso, bankroton de bankoj kaj realigon de totalismaj movadoj en pluraj eŭropaj landoj. Pli proksime, ĝia konstruisto Au-

gusto Gonçalves de Castro vidis la Pro-Konstitucian Revolucion, vere internan militon, celantan en 1932 la faligon de Getùlio Vargas kaj la kreadon de konstitucia registaro en Brazilo, kio konkretiĝis en 1934. Ĝuste en tiu kunteksto, internacia kaj samtempe nacia, komenciĝis la realiĝo de lia revo, nome la konstrulaboroj de sia Stel-domo. Jam de tempo Augusto Gonçalves sin dediĉadis, anime kaj korpe, al la Universala Frateco, surbaze de la internacia lingvo Esperanto kaj de tiu religio/filozofio, konata kiel Teozofio, kiuj grandinfluis lian projekton. Por sukcese realigi ĝin kaj havigi al si la bezonatajn materialojn li decidis vendi eĉ sian aŭtomobilon *Ford* el 1929!

Por la konstruo li aĉetis tabulojn el pino de Paranao (*Araucaria angustifolia*), longajn ses metrojn, kiuj estis utiligitaj por elfarado de du etaĝoj. Escepte de fenestroj, la domo ne havas ortajn angulojn; ĉiuj bazoj estas kvinangulaj, kvinpintstelaj.




Dek jarojn daŭris la domokonstruado. "Mia patro laboregis ĝis malfrue en la nokto", rakontas lia filino Idalina Gonçalves de Castro. Ŝia patro, tute sola, sen elektro kaj kun la helpo de nur sia edzino Dionísia Azulay, ĝin elfaris per mansegilo kaj aliaj iloj, kreitaj de li mem. Malgraŭ ke li ne estis lerninta la metion de lignaĵisto nek arkitekturon, ĉio en la domo estis aranĝite laŭnorme kaj precize. Precizeco fakte estas pruvo pri lia profunda matematika scio.

Kiel dirite, lia inspiro fontis el teozofio kaj Esperanto, kiuj akompanis lin laŭ lia tuta irvojo, ekde la projekto ĝis la kompleta efektivigo de domo stelforma. Ĉiuj liaj familianoj sekvis liajn idealojn, kaj filozofiajn kaj esperantajn. En la Stel-domo, *Casa Estrela*, la vizitantoj do havis la eblon akiri sciojn pri ambaŭ.


Ekde la 1990[aj] jaroj la domo iĝis neloĝata. Tio incitis la detruemon de vandaloj, kiuj bruligis kuirejon kaj ruinigis grandan parton de ĝi. Ĉar



poste la familio ne havis rimedojn por adekvate prizorgi la konstruaĵon, cele al ĝia transformiĝo en muzeon, por eviti pliajn damaĝojn kaj konservi ties historion, oni ĝin translokigis de kvartalo *Alto da XV* al kampuso de la Katolika Universitato (*PUC*), en *Prado Velho*.



En 2006, ekis la restariga procezo. "Necesis 20 tagoj por forporti la domon de ĝia origina loko. Ĉiuj pecoj estis numeritaj, poste malmuntitaj kaj lokigitaj ĉe *PUC*, por ĝin tie kunmetadi", rakontis arkitekto Claudio Fortes Maiolino. Laŭ li, 60% de la loĝejo konserviĝis. Li klarigis, ke iuj partoj devis esti anstataŭigitaj. "La domo havis partojn grave difektitajn. Ĉar ĝi estis el ligno, la kolonoj ruiniĝis. Sed ĉiuj framoj, la plafono kaj la planko estas originalaj". La filo de la konstruinto, Carlos Gonçalves de Castro, konsideras miraklon, vidi la domon restarigita. "Ĉi tio estis nia tuta vivo. Ni estis feliĉaj tie ĉi. Ĝi enhavis muzikon, idealismon; ĉi tie ludis grandaj klasikaj artistoj. Ĝi estis vigla kultura renkontiĝejo kaj homoj venis el la tuta mondo. Nia vivo estis feliĉa kaj mirinda", li kortuŝe memoras.



Konkrete nun ni vidu, per kelke da fotoj, kiel Augusto aplikis siajn ideojn kaj idealojn al tiu projekto. La kvinpinta stelo kaj la kvinanguloj aperas tra la tuta domo, ĉar tiuj simbolas la kvin kontinentojn. En la teretaĝo la ĉambroj estas ligitaj per portaloj el kvinpintaj steloj kaj la plafono de la supra etaĝo estas formita el kvinpinta stelo sur blanka fono. Alia arkitektura surprizo troviĝas en la doma kelo *[vd. supren]*, kie la centra kolono estas subtenita de ujo en formo de kvin-angula bovlo. Kiel dirite, escepte de pordoj kaj fenestroj, ne ekzistas rektaj anguloj en la konstruaĵo.

Casa Estrela estas unika en la mondo pro siaj formo kaj celoj.

Laŭ sciigo de J.R.Piton, adaptis k tradukis ElDo

Fontoj *(*kaj por ion plian ekscii, vizitu:*) https://www.pucpr.br/vida-no-campus/casa-estrela/*

http://g1.globo.com/pr/parana/noticia/2013/06/casa-em-forma-de-estrela-de-1930-e-restaurada-e-aberta-para-exposicao.html

https://arquivoarquitetura.com/022

Fotoj de: Caroline Mafra / ÓTV

Halt' al mikroplastoj!

Pri mikroplastoj, plej laste oni povis legi en TEA-Bulteno N. 152 kaj, bedaŭrinde, la problemojn oni eĉ ne komencis alfronti kaj ĉio antaŭa daŭre restas nesolvita: oni diskutas, raportas, promesas, sed pli ol nur paroli kaj paroli oni devas decidi kaj ekagi, tuj, antaŭ ol estos tro malfrue.




Tamen oni devas konsideri ke, pria parolado, ĉu favora ĉu malfavora, ĉiaokaze gravas, kiel asertas la konata proverbo: "bati la feron ĝis ĝi estas varma".

Nature mi konsentas, ke mia modesta pritraktado pri ĉi temo estas neutila, eĉ nula kaj vana, ĉar ĝi ne naskos iun ajn definitivan aŭ precizan respondon aŭ rezulton, sed miaopinie reveni al tiu seriozega argumento, tenas nian atenton vigla, strečita kaj ia ajn konstanta aktualigado pri pozitiva evoluo de esploradoj aŭ atentigo pri daŭre envenantaj novaĵoj, iel povas utili.

"For la mikroplastojn el lasivoj kaj kosmetikaĵoj!", estas la forte kria alvoko de *Greenpeace* (Verda paco), kiu skribe direktis al la ministro pri Medio peton subteni la proponon de la Eŭropa Agentejo pri ĥemiaj substancoj (*ECHA*) firme malpermesi la aldonon de mikroplastoj en multnombrajn produktaĵojn, de haŭtopurigiloj al vernisoj, kaj krome enkonduki pli striktajn normojn por eviti la disperdiĝon en la medion de plastaĵoj kaj mikrokorpuskloj.

La mikroplastoj, nome la korpuskloj je dimensioj sub 5 mm, povas formiĝi per detruiĝo de plastaj ruboj kaj materialoj, kiuj poste estas intence enmetitaj en industriajn produktaĵojn por plenumi diversajn teknologiajn funkciojn. Ĉi lastaj, tamen, povas forgliti el la purigaj instalaĵoj kaj disperdiĝi en la medion, ĉefe en la maron, kie ili estas konsiderataj bongustaj nutraĵoj fare de la fiŝoj kaj aliaj akvaj loĝantoj, kies fina destino foje estas ilia surtabligado en niaj domoj, restoracioj, manĝejoj k.s. Krome tiuj elementoj provokas la poluadon de la marsalo, kies konsekvencoj estas facile imageblaj.

Laŭ la donitaĵoj disvastigataj de *Greenpeace*, nur en Eŭropo ĉiujare en la medio amasiĝas 40 mil tunoj da mirkoplastoj. Nur kosmetikaĵoj averaĝe eligas 3800 tunojn/jare da mikrokorpuskloj, dum lasivoj kaj aliaj purigproduktoj pluajn 8500. La grundofekundiloj ellasas averaĝe, ĉiujare, 10 000 tunojn da korpuskloj, dum la materialoj uzataj por plenigo de sport-



aj kampoj per sinteza herbo diseligas eĉ 20 000 tunojn jare.

Tamen la problemo foje ne rilatas nur la mikroplastojn, ĉar, post testado farita de tiu asocio sur 1800 lasivoj por tuklavado kaj por domo-purigado, evidentiĝis ke multaj tiaj produktaĵoj enhavas ankaŭ spurojn el plastoj likvaj, duonsolidaj aŭ solveblaj, kies konsekvencoj rilataj al medio estas malmulte konataj.

Ekde la 2020ª jaro, Italio limigis la malpermeson de uzado de mikroplastoj nur en la kosmetikaĵoj, sed ne al tiuj apartenantaj al aliaj kategorioj, kiaj lasivoj aŭ vernisoj. Pro tio *Greenpeace* petis subteni la proponon de *ECHA* kaj, aldone, precize difini pli severajn kriteriojn pri la biomalkombinebleco. Sekve esencas forigi la minimum-dimensiajn limigojn por identigo de la mikroplastoj, absolute pliigi la malpermesojn ankaŭ al plastoj likvaj, duonsolidaj kaj solveblaj, eviti la eniĝon en la ➥

Kiaj estas la eblaj metodoj por malpliigi la uzadon de plasto?
Laŭ la plej fidindaj taksoj, en 2050 ni estos produktintaj pli ol **25 000 milionojn da tunoj el plastaj ruboj**, kies plej granda parto devenas de niaj hejmoj.
Nur eta parto estos recikligita aŭ cindrigita.
Ene de niaj etaj malvastecoj, se ni volas defendi la salubrecon de maroj kaj konservi ĉian vivantan estaĵon, la unua farendaĵo estas ŝanĝi niajn aĉet-kutimojn, per severa aplikado de la ĉisubaj reguloj.

- ✪ **Malpliigi:** elekti produktaĵojn havantajn malplimultan enpakaĵon, uzi aĉetsaketojn el ŝtofo, reŝargeblajn pilojn...
- ✪ **Selekti:** elekti ujojn redonotajn, ujojn el vitro anstataŭ el plasto...
- ✪ **Recikligi:** diferencigi la kolekton de ruboj …
- ✪ **Reutiligi:** produkti aĵojn ŝanĝante ilian orginalan funkcion; eltrovi novajn utiligeblojn...

medion de granuloj kaj reguligi la ĉeeston de mikrokorpuskloj en la kotoj de elpurigaj strukturoj uzataj en agrikulturo.



Notindas, ke per sia agado *ECHA*, starigita en 2007 kun sidejo en Helsinko, Finnlando, intencas apogi la sekuran uzadon de ĥemiaj substancoj. Ĝi plenumas la novigan normaron de EU, rilatan al ĥemiaĵoj, favore al la homa sano, medio, novigo kaj konkurencokapablo en Eŭropo.

Pliaj informoj ĉe https://europa.eu/european-union/about-eu/agencies/echa_it

Kaj nun io pri tute alia temo, kiu daŭre referencas la defendon de Naturo kaj ĝiaj vivantoj. Tiu ĉi estas temo tre tikla, pri kiu dum jaroj kaj jaroj mi cerbumis, serĉante elirvojon el la teruraĵoj pri kiuj vi tuj ekscios, kvankam, tutcerte, ja plenkonsciaj pri ili.

En la tuta mondo, precipe en ĉi lastaj tempoj, ofte aperas artikoloj pri ekz. vivisekcio, la barbara uzado de vivaj kreitaĵoj por pravigi pretekstajn sciencajn necesaĵojn. Aŭ oni aŭdas - de tempo al tempo - leviĝi protestoj kontraŭ la ĉasado, nome tiu praktiko, komencita de niaj praprauloj, kies tiama celo estis nura neceso plenigi la malsatan stomakon, kiu antaŭvidas serĉadon, postkuradon, kapton aŭ murdadon de sovaĝaj bestoj, ĉu flugantaj, ĉu kurantaj, ĉu naĝantaj, per uzo de ĉiaspecaj kaptiloj, armiloj kaj aliaj samkruelaj rimedoj.

Bonŝancas tamen, ke ekzistas asocioj kiuj agadas konstante por protekti la bestojn kontraŭ la fifaro homa. Bedaŭrinde tro malmultaj, sed pli bone io, ol nenio.

Laste mi malkovris interesan artikolon helpocele al omaroj kaj langustoj/palinuroj. La brita bestokuracista Asocio lanĉis protestalvokon por haltigi ilian mortigon per mergado en bolvarman akvon sen konsciiĝ-senigo. Sufiĉas do duonmortigi aŭ senkonsciigi, sendolore, tiujn kompatindajn krustulojn, antaŭ la kuirado. La Asocio kunigas 18 000 britajn profesiulojn kaj apelacias al leĝdonantoj pri normo, devige sekvota de ĉiuj kuiristoj sed ankaŭ civitanoj, por ke tiuj bestoj tiajn suferegojn ne plu devu elteni. La kialo tre klaras: jam estas science pruvite, ke ankaŭ krustuloj sentas doloron, eĉ se ilia nerva sistemo estas malsama, ol tiu de aliaj bestoj, kiel ekzemple mamuloj.

Jam dum multaj jaroj tiu ĉi problemo estis pridiskutata, ĉar iuj studoj pruvis laŭŝajan nesensecon al doloraj stimuloj. Eĉ oni aŭdacis diri, ke la krustacoj ne sensus pli da doloro, ol blato. Mi unue demandas min, kio donas al tiaj pseŭdosciencistoj la certecon, ke blatoj ne suferas!!!

En la lastaj jaroj post pliaj esploroj oni alvenis al malaj konkludoj kaj, samtempe, la konoj pri la plej primitivaj nervaj sistemoj pliprofundiĝis kaj ŝanĝis multajn el la klasikaj vidpunktoj pri nervaj cirkvitoj, kiel tiuj rilate la doloraĵn sentojn. Kaj ĝuste ĉi-lastan la brita asocio aludas. Cetere Aŭstrio, Svislando, Nov-Zelando, Norvegio kaj iuj aŭstraliaj ŝtatoj jam malpermesis tiun abomenindan kutimon.

Sekve de tio la tagĵurnalo *Mail Online* informis pri la iniciato kaj multaj kuiristoj en Unuiĝinta Reĝlando ekutiligis elektrajn aparatojn por senkonsciigi la bestojn: ankaŭ la itala ĉefkuiristo Giorgio Localtelli, posedanto de restoracio *Locatelli* en Londono kaj premiita per unu stelo *Michelin*, estas respektanta tiun regulon.

La Brita Veterinara Asocio ne haltigas sian agadon, strebante eviti suferojn al ĉiuj bestospecioj kaj nun petis samajn protektojn ankaŭ por polpoj, kiuj havas du (aŭ pli?) cerbojn, unu centran kaj alia(j)n en la tentakloj, kaj por sepioj, sed ne nur, ankaŭ por ĉiuj aliaj fiŝoj kaptataj je komerca nivelo. Fakte ne maloftas, ke tiuj estas vivtenataj en glacio, ĉikaŭze la morto alvenas malrapide, aŭ ili mortas sufokataj en la retoj, prematajn de la aliaj similuloj eĉ antaŭ ol esti elakvigitaj.

Kaj kio okazas en Italio? Ĉu ekzistas ia normaro por ĉesigi la suferadon de ĉiuj ĉi bestoj? Bedaŭrinde rilate tion ĉi ankoraŭ oni ne interkonsentis pri definitiva regularo: oni diskutas disputas kaj kverelas, dum la bestoj daŭre suferas suferas kaj suferas.

Rajtigita de **il fatto alimentare,**
https://ilfattoalimentare.it/


adaptis kaj tradukis Elda Doerfler

Aforismoj



Interpretisto: kiu donas la eblon al du diverslingvanoj interkompreniĝi, ripetante jen al unu jen al alia tion, kio por li estas pli oportuna diri.

Ambrose Bierce,
usona verkisto (1842-1914?)



Nenio ekzistas, krom atomoj kaj malplena spaco; ĉio alia estas opinio.

Feliĉo loĝas ne en havaĵoj, nek en oro, feliĉo loĝas en la animo.

Demokrito, helena filozofo
(460 a.K.- 371 a.K.)

Vivi en Harmonio kun la Naturo

Antaŭ kelksemajnoj la Kroata Esperanto-Unuiĝo kun la Triesta Esperanto-Asocio (en Italio) organizis *Semajnon de Internacia Amikeco* kaj la organizantoj petis, ke mi legu poemojn en kvar lingvoj, do japane, koree, hungare kaj esperante.

Japane mi legis la poemon de Miyazawa Kenji titolitan *Sen pluvo* kaj montris kiel noblanime la orientazia japana popolo klopodas vivi: modeste, honeste, utile, helpante aliulojn, senkolere kaj trankvile ridante. Dum mia studenta vivo en la Nanzan Universitato, Nagoya, mi persone povis sperti tiun allogan vivmanieron.

Poste mi havis eblecon instrui eŭropajn lingvojn en la Indramang Universitato en Koreio kaj ĉeesti okfoje, aŭ dekfoje, la internaciajn meditadajn renkontiĝojn en la Ŭonbulisma Religio. En la Indramang Universitato mi lernis, ke - laŭ la Indramang koncepto - interdependantaj rilatoj estas inter diversaj objektoj kaj fenomenoj de la Universo. Tio signifas, ke ĉiuj eventoj kaj fenomenoj havas kialojn, kaj oni devas agadi konforme al la ĝenerala leĝo de la Universo.

Tiu koncepto kongruas al la ŭonbulisma instruo, pri tio ni ĉiutage kutimas kanti mantron dum la meditadaj renkontiĝoj. La mantron verkis Ĝongsan, iama ĉefpastro de la ŭonbulisma religio. Nun mi citas la mantron en la orientazia interlingvo, ĉine kaj poste mi klarigos la tekston en la universala interlingvo, esperante, en tri versioj. La unuan tradukon faris Choe Taesok, la du aliajn mi mem tradukis.

天地靈氣我心定 Universa energio firmas en mia menso,

萬事如意我心通& ĉio vole interkomunikas kun mia menso.

天地與我同一體 Saman korpon formas kune kun mi la universo,

我與天地同心正 saman menson ĝustan havas mi kun la universo.

> *Per sanktaj energioj mia menso klariĝas.*
> *Kun universa leĝo mia menso unuiĝas.*
> *En interdependataj rilatoj inter ĉiuj estaĵoj*
> *miaj aferoj ĝuste plenumiĝas.*

Per sanktaj energioj mia koro trankviliĝas.
Ĉiuj laboroj same gravas, mia koro unuiĝas.
Ĉielo kaj tero egalas kun mi kun mia korpo.
Mi estas ĉielo kaj tero, kun tutsama trankvila koro.

La kerna signifo de la mantro estas:

Oni havigu al sia menso la energion de la Universo kaj mense unuiĝu kun la tuta Universo. Tial ĉiuj aferoj plenumiĝas laŭ nia volo kaj fariĝas ĝustaj.

Mi pensas, ke tiu instruo tute kongruas kun la okcidenta vivkoncepto. En la okcidenta mondo multaj sciencistoj kaj registaraj oficistoj opinias, ke indus vivi en harmonio kun la medio, kaj oni zorge konstatas, ke la homaro ne emas sekvi tiun instruon. Dum la lastaj kelkdek jaroj la interhomaj rilatoj malboniĝis. Oni povas sperti ĉiutage, ke en la metrooj homoj ne kutimas konversacii, sed ili izolite rigardas sian poŝtelefonon dum la tuta vojaĝo. La homaro malpurigis la aeron, vundis la ozontavolon ĉirkaŭ la Terglobo, kaj konstruis atombombojn per kiuj la vivkondiĉoj povus tute detruiĝi. La mondo povus esti pli bona loko por ĉiuj estaĵoj, se la homaro vivus laŭ la poemo de Miyazawa Kenji kaj laŭ la Ĝongsana instruo ĝenerale. Nun legante la 300-an jubilean numeron de la *Informilo* de NEC mi deziras, ke ankaŭ en la venontaj 300 numeroj la legantoj povu konatiĝi kun la riĉa orientazia kultura tradicio per la universala interlingvo esperanto.

Verkis d-ro Márkus Gábor



Atentigo!

Kiam eblos denove kunveni en nia TEA-sidejo, ĉiuj estos tuj kontaktitaj!
Ĝis la revido kiel eble plej baldaŭ!
La TEA-Estraro

Unesko kaj Esperanto

En aprilo aperis artikolo en *uea.facila* pri enketilo de Unesko en dek sep lingvoj, inter kiuj estas ankaŭ Esperanto. La temo de la enketilo estas la estonteco de edukado: kiuj estas la ĉefaj defioj kaj celoj de edukado?

Ĉiuj esperantistoj estis instigitaj respondi al la enketilo antaŭ la fino de aprilo, kaj efektive multaj homoj plenigis ĝin. La 3an de majo, la vicprezidanto de UEA, Trezoro Huang Yinbao, skribis al la respondeculo ĉe Unesko por demandi, kiom da homoj respondis.

Tre baldaŭ li ricevis respondon de s-ino S. Magalage, kiu informis, ke estis plilongigita por respondi al la enketo, je kromaj du monatoj. Interalie, ŝi skribis:

Ni estas tre ĝojaj informi vin, ke ĝis nun al la Esperanto-lingva versio de la enketo respondis 5 686 personoj.

Surbaze de tiuj respondoj, via komunumo konsideras, ke la ĉefaj tri defioj estas: 1) Klimata ŝanĝiĝo; 2) Ekonomiaj malegalecoj; 3) Milito.

Rigarde al la tri celoj de edukado, oni elektis: 1) Homajn rajtojn; 2) Pacon; 3) Daŭripovon.

En tiu ĉi momento 52 % de la respondintoj estas viroj, 43 % virinoj (certa kvanto el la enketitoj preferis ne informi pri la seksa aparteno). Aparte interesa estas la fakto, ke la junularo (inter la aĝo de 15-30 jaroj) provizis nin per 42 % de la respondoj: estas bonege, ke danke al vi ni eksciis multe pli pri la junularaj vidpunktoj rilate tiujn gravajn demandojn. Ni ĝojus ricevi pliajn respondojn de via komunumo.

Dankon ankoraŭfoje por via granda subteno kadre de tiu ĉi iniciato.

S. Magalage

Do, se vi ne jam plenigis la enketilon, eblas ankoraŭ fari tion ĝis almenaŭ la mezo de junio, per jena ligilo: https://en.unesco.org/futuresofeducation/top-3-challenges-and-purposes-education/Esperanto (mallonge: http://bit.ly/enketounesko2021).

UEA refoje alvokas, ke ĉiu ankoraŭ nerespondinta esperantisto plenigu la facilan enketilon laŭ la indiko sur la retejo.

Fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA - N-ro 950



Unesko lanĉis tutmondan debaton pri la estonteco de edukado: kunparolado pri la temo, kiel scioj kaj lernado povas formi la estontecon de la homaro kaj de la planedo.

Uno per tutti … cinque per mille!

AIUTACI AD AIUTARE L'ESPERANTO!

Il 5 per mille dell'IRPEF
all'Associazione Esperantista Triestina ODV
Associazione di volontariato
senza costi per voi!

Anche quest'anno i contribuenti, grazie alle disposizioni di legge, possono destinare il **5 per mille delle imposte** a sostegno delle Associazioni di **VOLONTARIATO.**

La nostra Associazione è fra gli enti che possono ricevere questo contributo.

È sufficiente indicare il numero di codice fiscale dell'Associazione nell'apposita casella per il VOLONTARIATO nel momento in cui si effettua la dichiarazione dei redditi (con il mod. Unico, il 730, il CUD, ecc).

Il codice fiscale da indicare è il seguente:

90012340320


Invitiamo perciò amici, parenti, conoscenti, colleghi di lavoro e tutte le persone che in qualche modo si dichiarano favorevoli all'esperanto, a scrivere nell'apposito spazio previsto nella dichiarazione dei redditi questo numero di Codice Fiscale.

GRAZIE!!!



Radiaj Alirprogramoj RAI Uno

9 junio	14h50 - Esperanto en la literaturo originala kaj traduk-ita



BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO ODV
Redaktanto: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
Sidejo/Poŝta adreso: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste
Kunventagoj: marde 18-20; vendrede 19-21
Tel: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936
Banka Konto: Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439
Reto: esperantotrieste@gmail.com nored@tiscali.it
Asociaj ttt-ejoj: www.esperantotrieste.altervista.org;
www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org